

Numero: 247.
Decembro: 2012.

20-a jarkolekto

LITERATURA FOLIO

VESPERTO



Redaktanto:
Apáti Kovács Béla
Kaposvár
Béla király u. 44.
H-7400 HUNGARIO
Telefona: 82/ 410-664
Retadreso: espbela@t-online.hu
Eldonanto: Kaposvara Esperanto Centro
Lingve kontrolis: Tuboly Erzsébet

Belegan Kristnaskon!

Paco regas en ĉi monato kaj nian koron inundas amo.

Bone sidi en varma ĉambro kun niaj gekaruloj kaj rigardi la ornamitan pinarbon. La rido de etuloj dolĉigas nian vivon.

Por unu momento ni rerigardu kaj rememoru pri niaj forpasintoj el tiu ĉi mondo. Ni kredu, ke ili ĉiam restos, eĉ ankaŭ ĉi vespere kaj nokte ili estas kun ni. Ili ne forlasis nin, ili nur transformiĝis. Ili estas ĉirkaŭ ni por ĉiam.

Ni esperu, la mondo pliboniĝos baldaŭe kaj la homaro vivos en eterna harmonio.

Ni forigu el nia koro la malamon! Vivi en malamo estas dolorplena kaj amara. Ĉi nokte nia koro ne dolorigu nin. El ĝi inundu la ĉambron, domon, eĉ la tutan mondon la espero kaj la lumo.

Mi preĝas por ĉiu mia homfrato, ke ili estu gajaj kaj bonhumoraj. Ili trovu la vojon al la paca kunvivado. De sur la tergloblo malaperu la milito kaj komenciĝu nova, pli bona mondo.

PACAN, BELEGAN KRISTNASKON POR ĈIU LEGANTO DE VESPERTO!

-Redaktanto -



HELTAI JENŬ Kristnaska poemo

En nia grava festo de la am',
Kiam ore rebrilas ĉiu flam',
Kiam, jen, ĉie ravas pompo,
Delektas nin abia frondo,
Kiam alvenas anĝelo por
Olduloj, beboj, ĉiu hom'
Kaj regas nur paco en la kor'.
Festas palac', malriĉa dom',
En nia grava festo de la am',
Kiam nin pelas nova plan',
Fervoras nova sent' amika,
Dum la interkompreniĝo mita,
Kiam, do, pardonas ĉiu kulpojn,
Riĉuloj helpas almozulojn,
Kiam sur budo, sur palaco
Blankas la beno de la paco,
En nia grava festo de la am'
Kiam eĉ kant', poemo, eble dram'
Klarigas jen per vortoj trafaj,
Kiel kortuŝas faktoj gravaj,
Kiam ĉiu rapide, fakte
Kuregas al la parencoj takte,
Kiam regas konkordo kara,
Kaj ĉiu jen estas solidara,
En nia grava festo de la am'...
Sed mi fine eldiru jam!
Kiam alvenas anĝelo por
Ĉiu, kaj plenas homa kor',

Kiam jen brilas ĉie pompo,
Delektas nin abia frondo,
La branĉoj sub kara pezo plendas,
Ornamoj, vantaĵoj tie pendas...
Kiom da homoj nun volonte plendus:
"Se nur *li* tie morte pendus,
Sur tiu branĉo..." Jen la plan',
En nia grava festo de la am'.

Tradukis:

Vizi László



Kristnaskaj fabeloj

Jesueto kaj la knabeto

En fora lando vivis knabeto kun sia patrino. Lia patro mortis pro akcidento. Por ili ambaŭ estis dolora, ke la sekvan Kristnaskon ili devos pasigi sen patro.

Ĉi Kristnasko estis tre malgaja. La patrino ploris dum la tuta tago. La knabeto atendis la vesperon, kiam la anĝeloj portos por li la petitan elektran fervojon.

La pinarboda vespero malfacile alvenis. La minutoj kaj horoj rampis ege malrapide. Por la knabeto ĉiu minuto estis mem la eterneco. Li deziris turnigi la radon de la tempo. Sed ĝi apenaŭ movis. Haltis la tempo.

Ĝi estis la unua Kristnasko sen patro. Efektive li ne sciis, kio estos la diferenco, se li ne estos kun ili.

Doloris por li la manko de sia paĉjo kaj li ofte vekigis matene serĉante lin. En la unuaj tagoj tio estis terura.

Komence la najbaroj diris, ke lia patro forvojaĝis kaj baldaŭe li revenos. Sed tiam kial estis la entombiga ceremonio en la tombejo. Li ĉiam sciis, ke en la ĉerko kuŝis lia patro. Ĉiu amare ploris ĉirkaŭ ĝi. Li neniam povas forgesi tiun sunbrilan aŭtunan posttagmezon.

Ili akompanis la ĉerkon de la domo ĝis la tombejo. Multaj homoj ĉeestis. Ĉiu estis bele vestita. Parencoj, amikoj, vilaĝanoj kunvenis la tuta vilaĝo. Dum tagoj oni parolis pri la akcidento. Ĝi venis subite, kiel fulmo el la sunriĉa ĉielo.

Por li estis stranga, ke lia paĉjo kuŝas en tiu stranga lignoskatolo. Eble sekrete li esperis alveninte la tombejon ĝia kovrilo malfermiĝos kaj lia patro ridetante elpaŝos el ĝi, kiel ĉiam kiam li alvenis hejmen el la laboro kaj li ekvidis sian fileton.

Kiel ajn li deziris tion, nun la kovrilo de la ĉerko ne malfermiĝis. Ĝi restis por ĉiam fermita, eĉ mem la ĉerko estis enmetita la tombon, kiun baldaŭe enterigis la senespereco, la rekono de la forpaso.

Interese, ĉi posttagmeze tiu ĉi trakuris lian cerbon. Li ne sciis, kiel pensi pri tiu malgaja tago. Nun oni devus atendi ĝojplene kaj ne pensi pri malbono.

Li ne povis liberiĝi de tio. Dum la tuta posttagmezo li pensis nur pri sia patro. Kiu helpas konstrui nun la fervojon kaj ekveturigi la etajn vagonojn kaj lokomotivon. Ĉu lia panjo povos helpi, aŭ li mem devos fari ĉion.

Dio rigardis lin el la ĉielo kaj post iom da tempo ankaŭ li ekploris. Granda larmoguto falis surteren, kiel giganta neĝofolko. Sed tion neniu vidis, nur la knabeto sentis ion en sia koro.

Varmo trakuris lian korpon kaj en la ĉambro disvastiĝis nekutima trankvilo kaj paco. Kvazaŭ ekstere en la frosta neĝo koloraj lumoj peladus unu kun la alia. Se oni silente atentis, tiam estis aŭdebla mallaŭta susurado de la flugiloj. Tiu ĉi susurado proksimiĝis kaj kvazaŭ jam ĝi estus super ilia domo.

La knabeto ekscitiĝis kaj malpacience atendis.

Dume ekstere malheliĝis kaj en la domoj ĉie lumoj bruliĝis.

En la aero estis festa atmosfero. Ĉiu infano sciis nun alvenas Jesueto kun la anĝeloj. Ankaŭ lin kaptis eksterordinara juktiklo kaj li ne povis atendi plu. Li enkuris la alian ĉambron, kie jam staris la ornamita pinarbo, kaj antaŭ ĝi ronde konstruita fervojo.


Tiam la knabeto ekkomprenis, Jesueto helpis konstrui por li la fervojon.

Lia patrino nur staris ridetante malantaŭ li kun larmoj en la okuloj kaj ŝi rigardis sian fileton, kiu feliĉe komencis ludi kun la fervojo.

Sed tion jam ankaŭ ŝi ne aŭdis, kiam Jesueto flustris en la orelon de la knabeto:

-Estu bona knabo, tion mesaĝas via paĉjo el la ĉielo!

-Apáti Kovács Béla-



Leporeto kaj la ruza vulpo

La leporeto vivis sur la kamparo en malgranda domo sub arbusto. En la proksimo estis densa arbaro kaj en ĝi troviĝis la domo de la ruza vulpo.

En la tuta jaro la vulpo ĉasadis, pelis la malfeliĉan leporeton, sed en la lasta momento ĉiam ĝi sukcesis rifuĝi.

Alvenis la vintro. Sur la kamparo kaj en la arbaro estis granda neĝo kaj inter la arboj kuregis la frosta vento kaŭzante doloron kaj timon al la bestoj de la arbaro.

Kiom belega kaj bona estis la somero, kiam la suno varme brilis. Ilin ne torturis la malvarmo, la vivo estis feliĉa kaj gaja.

Sed nun vintre ĉio ŝanĝiĝis. La arbaro mutiĝis. Ankaŭ sur la kamparo ne pompas koloraj floroj. Ĉie nur glacio estas.

La leporeto kaj la ruza vulpo enuis en sia domo kaj malgaje ili rigardis la vintran pejzaĝon.

Proksimiĝis Kristnasko. Post kelkaj tagoj okazos en la tuta mondo ĉi admirinda festo. La du bestoj estis solaj. Ilin neniu vizitis. La birdoj kaŝiĝis en siaj nestoj kaj ili ne deziris flugi nek al la leporeto, nek al la ruza vulpo.

Kial ili flugintus, se ekstere estas malvarmega vetero. Ili tuj frostiĝus, se ili forlasus sian varman neston.

La ruza vulpo ne povis elteni la solecon. Ĝi ne sciis, kion fari? Kie trovi kunulon por Kristnasko?

Ĝi triste sidadis en la domo kaj malĝojis. Kiel ĝi sidis tie neatendite enmemoriĝis al leporeto.

„Kio okazus, se nun ĝi vizitus ĝin kaj proponus pasigi kune Kristnaskon?” – komence li tuj forpelis ĉi penson – „Malbona ideo. La leporeto timas de ĝi. Somere ĝi ĉiam kaŭzis al ĝi malbonon. Certe ankaŭ nun ĝi forkurus ekvidante la proksimiĝantan vulpon”

La penso ne lasis ĝin trankvile. Plurfoje ĝi decidis viziti la leporeton, sed en la lasta momento ĝi forĵetis la ideon.

Jam estis preskaŭ tute vespero, kiam fine venkis la sopiro, kaj la ruza lupu ekiris al la dometo de la leporeto.

En la granda neĝo kaj sur la glitiga vojo ĝi apenaŭ povis iri. Por ĉiu paŝo ĝi devis lukti. Post longa irado fine ĝi alvenis.

Tra la malgranda fenestro flava lumo vidiĝis. Do certe la leporeto estis ene. Tio gajigis la ruzan vulpon.

Ĝi ne venis vane. Vere iom ĝi timis, kio okazos, se ĝin la leporeto ekvidos. Eble ĝi forkuros pensante, ke la ruza vulpo volos al ĝi malbonon.

Timeme ĝi ekfrapetis la pordon.

-Kiu vi estas? – aŭdiĝis mira voĉo el la domo – Kion vi deziras malfruvespere?

La ruza vulpo diris amikeme:

-Mi estas la vulpo. Mi venis al vi por ke ni kune festu la sanktan nokton.

Unue la leporeto pensis, ke la praa malamiko volas trompi ĝin kaj tiel ĝi volas endomiĝi. Ĝi laŭte elkriis:

-For de mia domo! Vi volas trompi min kaj se jam estos ene vi manĝos min.

La ruza lupu ege malgajiĝis. Vane ĝi venis en tia frostega vetero al la kampara dometo de la leporeto. Kiel pruvu, ke ĝi nun venis kun bonintenco. Ĝi nur deziras pasigi la sanktan nokton en amika rondeto. Ĝi ne havas geamikojn, kiel ankaŭ la leporeto vivas sola.

-Kara leporeto, - ĝi diris – kredu min! Ni fariĝu amikoj kaj lasu min eniri. Mi ne manĝos vin. Hodiaŭ mi venis nur por amikiĝi. Estas Kristnasko kaj ĉi vespere kaj nokte la homoj vivas en amo kaj paco. Ankaŭ ni sekvu ĉi belan kutimon!

La leporeto ne povis kion respondi. Ankaŭ li sentis, ke ne estas bone, se ili ĉiam militas. Estus bone vivi unu kun la alia en paco. Eble nun la ruza vulpo diris veron kaj efektive ĝi ne volas al ĝi malbonon.

Ĝi iris al la pordo kaj malrapide ŝlisis la pordon, kiu grinĉante malfermiĝis. Glacia vento ekfrapis ĝian vangon. Tiam ĝi ekkomprenis, se iu faras tiom longegan vojon en tia malvarma vetero, tiu certe ne mensogas. Ĝi kare diris:

-Bonvolu enveni! Fartu hejmece ĉe mi!

La ruza vulpo ankoraŭ neniam estis en la dometo de la leporeto. La agrabla varmo trankviligis ĝin. En ĝiaj okuloj brilis la flamo de la espero.

La leporeto regalis ĝin per varmega fruktoteo kun bongusta kuko, kiuj tre, tre gustis al la gasto.

Komence ili nur mute rigardis unu la alian, sed post kelkaj minutoj, kiel la glacio degelas je la sunbrilo, ekis la babilado. Ili promesis unu al la alia, en la estonto ĉio ŝanĝiĝos kaj ili fariĝos amikoj, ĉar vivi en paco estas pli bona ol militi.

Intertempe alvenis la noktomezo kaj el la proksima vilaĝo eksonis la sonorilo de la preĝejo.

Naskiĝis la Jesueto.

-Ŝaŝa-



Forlasite en vilaĝfina dometo

Sur la vilaĝo kuŝis la velura, frosta vespero. La homoj estis en la domoj sidanta apud la varma forno kaj ili malpacience atendis la naskiĝon de la Jesueto.

La tablojn estis surmetitaj multaj bongustaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj. El kelkaj domoj belaj kristnaskaj kantoj estis aŭdeblaj.

Ekstere neĝis kaj neĝis. Inter la domoj glacia vento kuregadis, kiel furioza ĉevalo.

Sed en la vilaĝfina dometo estis profunda malĝojo. Tie loĝis maljunulino. Ŝin jam delonge neniu vizitis. Ŝia unusola filo forlasis ŝin. Foje – foje kelkaj najbaroj portis al ŝi iom da manĝaĵo, sed ĝenerale ŝi vivis sola.

Ankaŭ ĉi kristnaske ŝi restis sen sia fileto. Tio estis ege doloriga por ŝi kaj ŝi nur ploris senĉese. Ŝiaj okuloj jam estis tute ruĝaj pro multe da ploro. Antaŭ kelkaj tagoj ŝi ricevis leteron de sia filo, ke li ne povos hejmenveni kaj kun ŝi pasigi la festojn.

Longe ŝi esperis, ke fine tamen en tiu ĉi jaro ŝi povos ĉirkaŭbrakumi sian etulon, kiel tiomfoje en la pasintaj jaroj.

Kiom belegaj estis tiuj festoj! Ŝi ofte pensis pri ili. Tiam ankoraŭ la patro de la filo vivis kaj ili triope staris ĉe la ornamita pinarbo kaj revante ili rigardis la dancantan flamon de la kandelo. Ĝia brilo ĉirkaŭbrakumis ilin kaj ili pensis, ke tiu ĉi momento neniam forpasos.

Sed ĝi forpasis. Unue ŝia edzo mortis neatendite. En iu mateno li ne vekigis. Bele li endormigis. Li ne estis malsana, eĉ oni ne vidis la antaŭsignojn de la proksimiĝanta morto. Laŭ la kuracisto lia koro haltis.

Post la entombigo baldaŭ okazis antaŭnevidita evento. Lia filo ricevis laborpostenon eksterlande. Bonega salajro. Kariero. Stulta estas tiu junulo, kiu forĵetas tiun ĉi eblon.

Kie li estas nun? – Ŝi pensis pri li. Sed li ne ricevis respondon.

Sur la tablo staris eta pinarbo kaj sur ĝi unu kandelo lumis en la malhela ĉambro. La ombroj malrapide dancis sur la muro kaj en la cerbo de la maljunulino denove reviviĝis tiuj malnovaj Kristnaskoj.

Estus bone, se ili revenus kaj ili triope estus kune. Ŝi sciis, tio jam estas neebla. Ŝi restis sola forlasita en la malgranda domo.

Se almenaŭ ŝia filo estus kun ŝi kaj kune ili preĝus al Jesueto. Kiam li estis knabeto, kiel belege li povis preĝi. Ŝi instruis al li preĝojn kaj ŝi fieris, kiam li deklamis ilin al la najbarinoj.

Tiutempe en ŝia koro ankoraŭ ardis la espero kaj ŝi ne povis imagi, ke iutage tiu ĉi idila bildo ne por ĉiam restos, kaj ili neniam forlasos unu la alian.

En la forno kraketis la fajro. Ŝi ekstaris kaj ĵetis kelke da lignoj en la fajron. La flamo ruĝe lumigis ŝian vizaĝon kaj la varmego sekigis la larmogutojn. Sed forlasante la fornon la larmogutoj denove komencis traruliĝi sur ŝia sulka vango. Ŝi ordigis

sian kaptukon kaj ŝi residiĝis al la tablo kaj rigardis la plafonon.

En la vilaĝo oni sonorigis en la katolika preĝejo. En la antaŭaj jaroj ŝi ĉiufoje iris tien kaj kun la liaj gevilaĝanoj kune preĝis dum la noktomeza meso.

La vilaĝon jam ankaŭ la pastro forlasis. Nun sen pastro sidas la homoj en la preĝejo kaj malgaje rigardas la altaron. Dume la ĉeestantoj monotone preĝadas.

En ĉiu dua semajnofine dimanĉe vizitas ilin maljuna pastro el la najbara vilaĝo.

Ĉi kristnaske ŝi ne iros al la preĝejo. Ŝi povas adori al Dio ankaŭ hejme en sia ĉambreto metante sanktan bildon sur la tablon. En la mano la preĝado libro kun rozario ŝi ekpreĝis mallaŭte.

-Dio mia tie supre en la ĉielo. Mi petas vin, ke almenaŭ dum ĉi sankta nokto gvidu al mi fileton mian. Mi petas vin nur unufoje en mia vivo mi povu revidi lin.... ŝi ne povis fini la preĝon, ĉar ŝi denove ekploris.

Pro la larmogutoj ŝi vidis malklare la objektojn en la ĉambro. Ŝi viŝis la okulojn per mola tuko trovita en la poŝo.

Ŝi ekĝemis kaj denove ŝi deziris daŭrigi la preĝadon, kiam abrupte ŝi ekaŭdis strangajn bruojn ĉe la pordo.

-Kiu estas tie? – ŝi demandis timigite – Ĉu iu estas ekstere?

Ŝi timis iri tien por rigardi, kio aŭ kiu kaŭzas la bruon. Ŝi tremis kaj senmove sidis sur la seĝo.

La pordo malfermiĝis larĝe. El la korto frosta vento enkuris la ĉambron.

Unue ŝi ne volis kredi al siaj okuloj. Ĉe pordo kun grandaj valizoj staris lia filo.

Pro la surpizo ŝi nur plorante elbuŝigis kaj kuregis al la junulo:

-Fileto mia, ĉu tamen vi hejmenvenis al via patrino?

-Apáti Kovács Béla-



Sekreto

Mi kun mia bona amiko Szűcs Peti cerbumis kiel povas enporti la anĝeloj la ornamitan pinarbon, se la pordoj kaj fenestroj estas fermitaj, eĉ ofte ankaŭ ŝlositaj. Ni neniam sukcesis kaŝrigardi, kiel okazas tiu ĉi miraklo. Kvankam ni ambaŭ estis tre scivolaj por ekscii tion.

Ni ne dubis, ke Jesueto kaj anĝeloj ekzistas. Ili alportas la pinarbon kaj la donacojn por ni infanoj, ĉar ĝis nun ĉiufoje ni ricevis multe da ludiloj, dolĉaĵoj.

Ĉiam la sonorileto signis al mi, ke alvenis Jesueto. Mi kuregis en la ĉambron esperante, mi sukcesos ekvidi almenaŭ la flugilojn de la anĝeloj. Vane mi rapidegis, mi jam nur vidis la bele ornamitan pinarbon kun la donacoj. Almenaŭ la fenestro estus malfermita, por ke mi trankviliĝu, tra ĝi enflugis la anĝeloj.

En la sekvaj tagoj mi kun mia amiko Peti denove komencis cerbumi, sed ni ne trovis klarigon je la sekreto.

Ankaŭ ĉe li same okazis la vizito de Jesueto kaj la anĝeloj.

Kiu scias la veron? Kiu povas klarigi al ni, kiel trafikas la anĝeloj tra la fermitaj pordoj kaj fenestroj?

En la vilaĝo ni ekiris por malkaŝi tiun ĉi grandan sekreton.

En la najbaro estis maljuna hundo Pajtás. Unue ni iris al ĝi.

-Kara hundeto, - ni diris – bonvolu diri al ni, kiel eniras la domon Jesueto kaj la anĝeloj? Certe vi vidas ĉion. Ja vi gardas la domon.

La maljuna besto nur balancis sian kapon kaj respondis malgaje:

-Knabetoj, bedaŭrinde ĝin mi ne scias, kvankam mi jam vivis multe da jaroj. Mi proponas, iru al la ĉevalstalo, kaj tie demandu de la saĝa ĉevalino. Ŝi estas tre saĝa kaj certe ĝi povos helpi al vi.

En la tria najbaro estis ĉevalstalo, kie estis la ĉevaloj de la oĉjo Pista. Inter ili estis ankaŭ la saĝa ĉevalino.

-Bonan tagon saĝa ĉevalino! – ni salutis ĝin – Ĉu vi scias, kiel eniras Jesueto kaj la anĝeloj en la domon?

La saĝa ĉevalino longe pensadis kaj fine ĝi elbuŝigis:

-Mi scias multe pri la mondo, sed tion mi ne scias.

Ni tre malgajiĝis ekaŭdante tion kaj senespere ni rigardis al ĝi. La saĝa ĉevalino certe kompatis nin. Ĝi konsolis nin.

-Ne ĉagrenu knaboj! Mi elpensis ion. Ĉe la vilaĝfino loĝas maljunulino. Iru al ŝi! Laŭ la birdetoj, kiuj pepadas sur la proksima arbusto, diris, ke tiu ĉi maljunulino scias ĉion.

Ni dankis la helpon kaj ni ekiris al la vilaĝfina maljunulino.

Ni tre timis, ĉar ankoraŭ ni neniam estis ĉe ŝi, eĉ sen niaj gepatroj en tiu parto de nia vilaĝo.

La dometo estis tre tre malproksime. Dumvoje multaj hundoj timigis nin, kiuj staris ĉe la bariloj ekvidante nin ili laŭte ekbojis.

Ofte ni jam pensis returni nin, ĉar nia entrepreno ŝajnis al ni tre danĝera. Sed ni instigis unu la alian, kaj fine ni alvenis la dometon de la maljunulino.

Enpaŝante la domon ŝi sidaĉis apud la forno kaj ŝi ege ekmiris, kiam la du knaboj salutis ŝin.

-Bonan tagon onklino! – ni diris timeme.

-Saluton! – ŝi respondis – Kion vi volas?

Ni detale rakontis al ŝi nian problemon. Ŝi atente finaŭskultis nin kaj diris:

-Efektive ĝi estas granda problemo. Bonŝance, ke vi venis al mi. Mi scias la respondon je via demando. Sed bedaŭrinde mi ne rajtas paroli pri ĝi al vi. Se mi parolus, mi tuj fariĝus ŝtono. Espereble vi komprenas min. Ne malĝoju, kiam vi estos plenkreskuloj, ankaŭ vi ekscios tion, kiam vi havos gefilojn. Nun iru hejmen, ĉar jam certe viaj gepatroj atendas vin kaj baldaŭ malheliĝos.

Ni vane petis, ke ŝi rakontu al ni, kio okazas, kiam venas Jesueto. Ŝi ne parolis, eĉ unu vorton. Fine ni devis kompreni ŝin. Verdire neniu el ni deziris, ke el ŝi fariĝu ŝtono.

Nun jam, kiel plenkreskulo mi scias, kio okazas, sed ankaŭ mi ne malkaŝas la sekreton al vi, infanoj. Espereble vi komprenas min.

GAJAN, FELIĈAN KRISTNASKON AL VI ĈIUJ INFANOJ KAJ LA LEGANTOJ DE VESPERTO!

-Onklo Adalberto-

